# TEJO-aktuale: numero 47, 2002-02

## INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN BRAZILO: PLIAJ INFORMOJ

La 58a Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazos de la 21a ghis la 28a de julio 2002 en la urbo Pato Branko (Pato Branco), en suda Brazilo. Multe helpos al preparlaboro loka teatra grupo, kies gvidantino, Eliane Gauze, prezidas la Lokan Kongresan Komitaton. La temo sonas jene: "Lingvo, kulturo kaj oportunecoj". En la pagharo jam troveblas la kongresa programo, alighpagho, surpaperigebla alighilo ktp.

Chi-jare ankau la Universala Kongreso okazos en Brazilo, en la norda urbo Fortalezo, de la 3a ghis la 10a de augusto. De la IJK vojaghos al la UK busa karavano: ghi dauros ses tagojn kaj haltos unu nokton en en San-Paulo, du en Rio de Janeiro kaj unu en Porto Seguro (suda marbordo de Bahia).

Nastja Kojhevnikova, TEJO-estrarano pri kongresoj nastja@ikso.net

## NOVA RETADRESO DE LA TEJO-OFICEJO

La nova adreso estas oficejo@tejo.org; la antauaj adresoj
tejo-oficejo@esperanto.org kaj
tejo-oficejo@wxs.nl
ne plu validos.

Christopher Culver, TEJO-volontulo en la Centra Oficejo de UEA kaj TEJO

## MARBORDA INTERNACIA RENKONTIGHO EN KROATIO

Puntizela (apud Pula, Kroatio), 22 - 26 Marto 2002: Kroatia E-junularo organizas Marbordan Internacian Renkontighon (MIRo). Informoj:
http://www.angelfire.com/va2/Vanja/miro8.html, Vanja.Radovanovic@etk.ericsson.se.

## UKRAINIO: HUMURA FESTIVALO

Odessa (Ukrainio), 30 Marto - 1 Aprilo 2002: Humura Festivalo "Aprilaj ridetoj". Loghado che junaj odesaj esperantistoj, manghado memzorga, tre richa programo. Informoj kaj alighoj: zoo@te.net.ua, verda99@mail.ru.

## UKRAINIO: JUNULARA EKOLOGIA EKSPEDICIO

Delto de la rivero Dnestro, 29 julio - 11 augusto 2002: Junulara Ekologia Ekspedicio. Loghado en tendoj au en dometo, komuna kuirado. Ekskursoj en la naturo, esploroj, kursoj pri E-o, biologio, birdoscienco, distrajhoj ktp. Informoj kaj alighoj: zoo@te.net.ua, verda99@mail.ru.

## BILDKARTA KONKURSO EL DOMINIKA RESPUBLIKO

Dum la unua Esperanto-kurso en Dominika Respubliko okazos bildkarta vespero la 20an de marto 2002. Sendu do bildkarton al la instruisto: la sendintoj de la tri plej belaj kartoj gajnos KD-on kun dominika muziko! La adreso estas: Rafael DESPRADEL, P.O. Box 838, Santiago de los Caballeros, Dominika Respubliko.